

N°167
juillet
août
septembre
2014

LA INFORMILO

N° 167
julio
aŭgusto
septembro
2014

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2014
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Por eksterlando: 18€

Reta abono: 7,50€



Polyglotte grâce à l'espéranto

Message de Cyrille Hurstel, le père d'Amy:

La saison de recrutement des clubs locaux va commencer et nous allons argumenter sur l'intérêt de notre langue. Quand nous expliquons que l'espéranto prépare à l'apprentissage ultérieur des langues, c'est très abstrait, trop abstrait pour toucher émotionnellement un être humain.

Prenez un exemple vivant.

Il y a 10 ans, j'ai décidé de rendre bilingue ma fille aînée Amy qui avait 5 ans. L'espéranto a accéléré l'apprentissage de l'allemand qu'elle a appris à l'école. L'espéranto lui a fourni des amies allemandes. L'occasion d'aller en Allemagne. La motivation pour progresser (Quand bien même elle utilise l'espéranto avec ses amies allemandes).

Elle a progressé, certes, mais de combien? Elle a passé le KMK en juin et l'a eu (Niveau B1). (Détails ici <http://blog-bilinguisme.fr/allemand/passer-le-kmk/>)

Il existe en Alsace des classes bilingues qui préparent l'Abitur du Baden-Wurtemberg en plus du Baccalauréat.

Ces classes "Abibac" sont composées d'enfants qui ont fait leur scolarité en français et en allemand dans des classes bilingues ou qui ont un parent allemand.

Amy n'a pas de parent allemand, n'a jamais été en classe bilingue, et pourtant elle a été acceptée en classe Abibac!

Comment est-ce possible?

Parce qu'elle parle l'espéranto! Et qu'elle a commencé tôt. Il faut commencer les langues tôt.

(L'article d'Amy est là <http://blog-bilinguisme.fr/allemand/entrer-en-section-abibac/>)

Je pense que c'est un bon exemple pour rendre vivante cette notion abstraite et montrer que tout le monde peut apprendre l'espéranto et en profiter.

Et pour finir, Amy a passé 2 semaines à l'école à Londres cet été, car l'anglais est sa 4ème langue. Rien ne presse pour l'anglais, si important du point de vue professionnel, car il est de toute façon interdit de faire travailler des jeunes de moins de 15 ans! Commencer les langues tôt ne signifie pas forcément "Commencer l'anglais tôt".

LA 47-a ILEI-KONFERENCO EN MONTEVIDEO 19a-25a julio 2014

Antaŭ la Universala Kongreso en Argentino okazis en la Urugvaja ĉefurbo Montevideo la 47-a ILEI-konferenco. La eventon ĉeestis 75 geesperantistoj el 26 landoj. ILEI-konferencoj kutime komenciĝas per franda vespero. Ĉiu partoprenanto alportas ion el sia lando por gustumigi la aliajn. Kolektiĝis multe da frandaĵoj kaj interbabilante la homoj konatiĝis.


La solena inaŭguro okazis en impona konstruaĵo de la Nacia Parlamentejo. Al la inaŭguro ĉeestis la urbestro s-ino Ana Olivera kaj du reprezentantinoj de la regiona oficejo de Unesko en Montevideo, inter kiuj estis la direktorino s-ino Lidia Brito. La ĉeestantojn bonvenigis s-ino Mireille Grosjean el Svislando la prezidantino de ILEI. Ankaŭ la urbestro kore bonvenigis nin kaj deziris al ni sukcesan laboron. Same bonvenigajn vortojn direktis al ni la direktorino de la Unesko-oficejo. Poste parolis la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kaj sekvis du mallongaj prelegoj rilataj al eventoj antaŭ 60 jaroj.



En la sama loko la ĝenerala konferenco de Unesko aprobis la unuan rezolucion favoran al Esperanto en la jaro 1954. Por ni tio estis vere grandioza kaj digna evento povi esti en tiu tiom signifoplena historia loko dank'al la klopodoj kaj sukceso de lokaj esperantistoj sub gvido de Sonia Risso. Poste ni havis eblecon viziti sub gvidado la parlamentejon kaj kunvenejojn de deputitoj kaj senatanoj. Impresis la ampleksa biblioteko. Forlasinte la parlamentejon ni en apudeco sur herbejo plantis gujavan arbeton. Ĉiu aldonis al ĝi iom da tero aŭ akvumis ĝin. Apud ĝi estis malvaluita memortabulo kun la jena teksto: Esperanto-Unesko, 60 jarojn kune 1954-2014.

La konferencaj prelegoj okazis en Ateneo ĉe la placo "Cagancha". Sur ŝtofo estis prezentita la markemblemato de ILEI. S-ro Alberto Baroccas ricevis de urugvajaj esperantistoj enkadrigitan diplomon pro sia 60-jara laboro por Esperanto. La konferencanoj eksciis pri instruado laŭ Tinĉjo-libro, oni parolis pri

La konferencaj prelegoj okazis en Ateneo ĉe la placo "Cagancha". Sur ŝtofo estis prezentita la markemblemato de ILEI. S-ro Alberto Baroccas ricevis de urugvajaj esperantistoj enkadrigitan diplomon pro sia 60-jara laboro por Esperanto. La konferencanoj eksciis pri instruado laŭ Tinĉjo-libro, oni parolis pri



nuntempaj tendencoj en la lingvo-instruado kun aparta atento al la rolo de teknologio, pri kultura komunikado, pri la projekto "Ceibal"-havigo de malgrandaj komputiloj por ĉiuj lernejoj, Urugvajo, por plifaciligi la lernadon ankaŭ por gepatroj, pri afrika influo en muziko kaj kulturo.

La komitato de ILEI elektis du novajn honorajn membrojn - la forpasintan profesoron Helmar Frank kaj s-ron Rob Moerbeek, kiu ĉeestis la konferencon. Krome estis elektitaj kvar novaj landaj sekcioj en Irano, Hispanio, la Demokratia Respubliko Kongo kaj Bulgario. Oni decidis aperigi la revuon Juna Amiko kvarfoje jare.



La konferencon partoprenis ankaŭ la prezidanto de UEA Mark Fettes. La simpozio en Montevideo esploris lingvan justecon en praktiko. Okazis serio da interesaj prelegoj: pri indiĝenaj popoloj, pri dulingveco, Esperanto kaj medicino, lingva justeco en Eŭropo kaj multlingveco en Eŭropa Unio, Rob Moerbeek dum la paŭzo animis eraro-logion kaj la simpozio finiĝis per prezento de rekt-metoda kurso en interreto Saluton!



Dum la nacia vespero ni ekkonis la historion de Ĉarua etno kaj spektis prezenton de folkloro danco, kantojn prezentitajn de infanoj kaj ne mankis tango-prezento. Ankaŭ niaj talentuloj kontribuis al la posta internacia vespero kaj prezentis dancojn, spritaĵojn, deklamis poemojn, gitar- kaj pianludis, kantis. Bonega estis la banke-



do en la restoracio "El Fogón" en akompano de muzika duopo. Per duetaĝa turisma buso ni trairis la urbon kun surbendigitaj esperanto-klarigoj ĉe ĉiu interesa punkto. Malgraŭ la pluva vetero ni ĝuis

belan ekskurson al "Punta del Este". Tie ni admiris marvirinetojn, fingrojn elstarantajn el sablo (monumento fare de ĉiliano Mario Irarrázabal), kie ni fotiĝis man-en-mane. Tre impresa konstruaĵo "Casapueblo" situanta en "Punta Ballena" estas muzeo de Carlos Páez Villaró. Tie oni povas admiru liajn artaĵojn.

Atenton elvokis multaj homoj promenantaj surstrate kun termoboteloj, mateuoj kun suĉiloj kaj ĉiumomente trinkantaj la mateon. Ĝi estas la plej populara nacia trinkaĵo en Urugvajo.





Oni ankaŭ povis spekti vesperajn tango-dancantojn apud la ĉefstrato. Ĉiu, kiu deziris kaj scipovis havis eblecon enviciĝi kaj kundanci. Tre interesa estis lingva festivalo antaŭ la Ateneo ĉe frekventata strato. Ni prezentis 16 lingvojn kaj disdonis varbilojn pri Esperanto. Kelkaj preterpasantoj kaptis okazon kaj scivoleme sekvis duonhorajn lecionojn. Plej grandan atenton vekis la japana kaj nepala lingvoj.

Vendrede la plejmulto de konferencanoj karavane busveturis al “Colonia de Sacramento”, kie ili vizitis pitoreskan urbeton enskribitan en la listo de mondaj heredaĵoj de Unesko kaj poste daŭrigis per ŝipo al Bonaero. Dum la semajno ni havis buntan programon kaj ĉiuj bone amikiĝis kaj amuziĝis dum la paŭzoj. Koran dankon al urugvajaj samideanoj, kiuj strebis al bona disvolviĝo de la konferenco en tiu-ĉi signifoplena jubilea jaro inter Esperanto kaj Unesko pro la 60-a jariĝo de la unua Rezolucio. Moralan subtenon al la konferenco esprimis ankaŭ la urugvaj prezidento Don José Mujica.



Raporto de Liba,
fotoj de Andreo

Somera Esperanto Studado en Nitra, Slovakio 12a-20a de julio 2014

en la universitata studenthejmo Zobor. Nitra estas bela kaj historia urbo,
situanta nur 90 km de Bratislavo kaj 50 km de Trnava.

Raportas pri la evento Ginette.



SES 2014, Nitra

La unua impresio pri la urbo estis tre favora, ĉar ni estis 6 esperantistoj ĵus alvenintaj ĉe la bus-stacio de Nitra kaj ni rapide trovis du malmultekostajn taksojn, kiuj kondukis nin ĝis la studenta domo, kie estis okazonta ĉio: kursoj, manĝoj, dormoj, distraĵoj.

Fakte ne komplete ĉio okazis tie, ĉar, pro tre granda sukceso de la aranĝo, du kursoj okazis en proksimaj restoracioj kaj tie la lernantoj povis ĝui similajn tagmanĝojn en simila prezo por eviti reveni al la studenta domo. Ĉu tiu eksteriĝo de la Someraj Esperantaj Studoj produktis novajn ne-antaŭviditajn adeptojn? Mi ne scias. Ĉu la homoj, kiuj studis en restoracioj, havis sufiĉe da koncentriĝo por lerni? Mi ne certas, sed mi admiras la elturniĝemon de la organizantoj, kiuj preferis ne rifuzi homojn, kaj serĉis originalajn solvojn, ĉar estis atenditaj 278 homoj. Ne ĉiuj venis, sed certe venis grandega nombro. Se mi bone kalkulis, tio estis la 8a jaro de SES.



La malmultekosta flanko de tiuj Someraj Esperantaj Studoj kaj ĝia famo allogas ĉiun jaron pli kaj pli da homoj,

ĉefe junulojn. Ekzemple: inter du konstruaĵoj de la studenta domo, agrabla herbejo atendis la homojn, kiuj venis kun tendo. Pluraj uzis tiun eblon tute senpagan; la loko estis bela, trankvila, ili havis duŝojn interne por lavi sin.

Post mia prezento ĉe la akceptejo, mi rapide ricevis ŝildeton, sakon kun dokumentoj kaj numeron de mia ĉambro. Mi havas necesejon kun lavabo, duŝo kaj fridujo por 4 personoj kuŝantaj en du ĉambroj. Mi dividas mian ĉambron kun ukrainino de Kievo, kaj ni bone amikiĝis. La situacio en Kievo estis stabila, kiam ŝi ekvojaĝis; dum la daŭro de la sesio la politikaj problemoj ne tro turmentis ŝin. . .

Inter tiuj komfortaĵoj la studenta domo disponigis al ni en la koridoro dekduon da komputiloj, kiuj funkciis tre bone, senpage, tamen ili funkciis per slovaka lingvo kaj klavaro ne ko-

nata de mi. La helpantoj donis nur kelkajn sekundojn de helpo, faris tro rapide la movojn por helpi kaj klarigis neĝon. Mi bezonis peti helpon dum tri sinsekvaj tagoj antaŭ ol kompreni, ke oni bezonas aklaki samtempe tri klavojn por fari la arobason @, kaj nur ĉe la fino de mia restado mi povis utile uzi ilin. (Mia propra komputileto ne volis retumi kaj utilis nur por kontroli miajn fotojn).

La enhavo de la sako estis ne-banala. Ĉiuj ricevis virgan kajereton kun krajono, sufiĉe grandan por la tuta studodaŭro. Ĉiu el ni ankaŭ ricevis libron, parton el ni ricevis la romanon "Surklifa" de Serĝo Elgo. La celo de la organizantoj estis, ke ni iĝu lego-amantoj. Parto de la ĉeestantoj ricevis alian titolon kaj ni povis interŝanĝi libron kun aliuloj, se ni jam posedis la donacitan.

Mapo de la urbo, papero kun kelkaj frazoj en la slovaka lingvo, libreto pri vegetarismo kompletigis la enhavon de la sako.

Antaŭ la sabata vespermanĝo, ĉiuj kunvenis en la manĝosalono kaj ni ricevis plenigendan teston, kiu taksu nian nivelon kaj enkonduku decidon, en kiu grupo ni estos. Estis starigitaj ĉirkaŭ ok kursoj kun ok instruistoj kaj unu speciala "literatura rondo" kun Jorge Camacho kaj Nicola Ruggieri. Kvankam mi jam petis mian enskribiĝon en la literatura fakoj, mi amuziĝis en skribado de la testo. Temas pri gramatikaj demandoj, al kiuj oni respondas per kruco, selektante unu el kvar proponitaj respondoj. Mi ne ricevis rezulton de mia testo, sed mi supozas, ke mi sukcesis 95% de la testo.

Vespere, en la granda salono, Peter Baláž prezentis la programon por la tuta semajno. "Pro la granda nombro da novuloj, diris Peter, mi parolos en Esperanto, kaj Paŭlina tradukos angle,





sed. . . ĉe la fino de la semajno, la traduko al la angla ne plu estos, ĉiuj devos kompreni la esperantan.”

Peter Baláž ankaŭ prezentis la “anĝelojn”, membrojn kiuj akceptas solvi la problemojn renkontitajn de novuloj. Mi foje vidis ilin petataj por blinduloj aŭ iu alia afero, ĉar ĉi-jare por la unua fojo venis blinduloj.

Post tiu parolado de Peter okazis ludoj de sinprezentado. Oni faris 12 grupojn laŭ la monato de naskiĝo, unu “anĝelo” devis animi ĉiun grupon. La ludoj estis “mi estis (nomo). . . kaj mi ŝatas (gesto)” kaj ĉiuj devis ripeti la frazojn jam ditajn. Alia ludo: ludanto kaŝis sin malantaŭ kurteno. Li/ŝi rapide malkovris sian vizaĝon kaj la aliuloj devis diri lian/ŝian nomon eble plej rapide. (Mi ne vidis tiujn

ludojn, mi jam estis en la lito, sed oni rakontis la tuton al mi.)

Dum la tuta aranĝo, ĉio glate funkciis. Post la matenmanĝo, ĉiuj iris en la stud-salonojn. Mi estis en la ĉambro, kiu enhavis la libro-servon; tio estis granda avantaĝo. Mi ĝuis tre interesan grupon kaj interesajn animantojn. Ni tute ne estis pasivaj; ni ne nur lernis pri la esperantaj verkistoj kaj poetoj, ĉiutage ni devis krei ion: hajkojn aŭ verketojn, eĉ teatro-pastiĉojn.

Posttagmeze okazis diversaj ekskursoj, aŭ aliaj okupoj por tiuj, kiuj ne volis ekskursi. Pri la ekskursoj mi parolos pli poste. Ekster la ekskursoj, mi ĉeestis kurson de slovaka lingvo, prelegon pri vegetarismo, balet-kurson (trejnado por klasika danco) kaj tango-kurson. Sed la ebloj estis multegaj. Paĝoj kaj paĝoj ne sufiĉus por rakonti ĉion.

Pri vegetarismo: la ĉeestantaj homoj estis kuraĝigitaj per rabato enskribi sin por vegetara dieto; manĝi vegetare kostis malpli. Tiu rabato instigis pli da homoj ol kutime provi la vegetaran menuon. Mi mem provis kaj ne tro plendis, mia stomako ne riproĉis ion, tamen la menuoj ne ĉiam estis ekvilibrataj: kelkfoje nur pastaĵojn en la sama manĝo, kelkfoje nur krudaj legomoj kaj fruktoj.

La alia bona iniciato estis la uzo de persona tasego, kiu akompanis nin dum la manĝoj kaj kafo-paŭzoj, por ŝpari la forĵetablajn plastajn glasojn. Multaj sekvis tiun bonan ideon, eĉ se la forĵetablaj glasoj ĉiam aperis. Oni povis aĉeti unu tasegon aŭ uzi sian propran.

Pri la posttagmezaj ekskursoj, mi malmulte rakontos. Ili estis tre interesaj, kun bonaj gvidantoj kaj tradukantoj kaj ĉiam akompanataj de gustumado (teo, vino, en specialaj ceremonioj). La fotoj montros pli multe ol mi povas diri.

Restis paroli pri la distraj vesperoj. Ili estis unikaj. Nacia folkloro komencis trankvile montri siajn talentojn dimanĉe. La sekvajn tagojn, Jomo, Kim kaj Kaŝi vere «metis la fajron»; ne forgesiblajn momentojn ni travivis!

La projekciado de paroloj sur ekrano tre helpis por sekvi la kanzonojn de Jomo, Kim



Somera Esperanto-Studado Nitra 2014

kaj Kaŝi. Tiuj, kiuj ne freneze dancis, povis kunkanti. En la kulmina punkto, ĉiuj hurlis "Aleluja Zamenhof. . . Aleluja Zamenhof. . . Zamen. . . Zamen. . . Zamenzamenhof!"

Antaŭ la ekcitaj momentoj kun Kaŝi, Marek Blahus organizintis en la granda salono kvizon kun tri kandidatoj. Tiuj-ĉi povis gajni poentojn en kvar kategorioj: historio de Esperanto, historio de SES, vortoj sur PIV, kaj trovo de mankanta vorto en proverboj. Ni povis vidi la kalkulojn de poentoj sur ekrano kaj aŭskulti la kandidatojn, eventuale doni respondon, se neniu el ili trovis. Ĉio estis klare videbla sur ekrano, kiel tio povas okazi en televidaj ludoj, kaj tre profesie farita. Komplimentojn al Marek.

Kaj la postan tagon, ĵaudon posttagmeze, mi jam devis reveni hejmen. Mankis al mi la du sekvaj tagoj, sed mi ne dubas, ke ili estis same dinamikaj kaj eksplodemaj kiel la antaŭaj.

La reven-vojaĝo donis al mi aliajn aventurojn, kiujn mi rakontas sur alia dokumento.

Vere bonegan restadon mi ĝuis en SES 2014!

La reveno de Ginette

Mi revenis hejmen vendrede el Slovakujo, kaj mi kolektis serion da katastrofoj dum la vojaĝo. Unue la ŝoforo de la buso en Nitra metis mian valizon en la kofron kaj preskaŭ tuj foriris. . . sen mi! (Kunestis, apud la pordo de la buso, homoj kiuj atendis la saman buson kaj iuj, kiuj atendis alian buson. La ŝoforo ne atentis pri tio, neglektis demandojn, kiu ankoraŭ devas esti por sia buso). Vane mi levis la brakojn ĉielen, kiam mi vidis la buson, kiu fuĝis. Mi rapidis al la informejo, eble iu povos telefoni al la ŝoforo, ke li revenu. Ve! La informejo estis fermita. Mi demandis al la ĉirkaŭantaj homoj por trovi taksion, neniu helpis! Finfine mi vidis buson, kiu pretiĝis por iri al Bratislava. En balbutanta angla mi provis rakonti al li la katastrofon. Li povis nenion fari, nur akcepti min en sia buso kaj mi devis pagi, ĉar li ne laboris por la sama entrepreno. Jen mi en Bratislava, kaj mirakle mi retrovis sur la haltejo la buson kaj la ŝoforon de la buso, kiu fuĝis sen mi. Li malfermis la kofron, redonis la valizon, tute ne petis pardonon kaj diris "After fifty five minutes you'll have another bus". La celata buso, kiu devis konduki min rekte ĝis Francujo, neniam venis, sed mi eksciis tion pli poste, kaj mi ne plu povis koleri kontraŭ la ŝoforo de la unua buso, ĉar ankaŭ li jam ŝoforis al alia direkto. Feliĉe afabla slovaka virino kun sia filino decidis savi min. Dum la komuna atendado de la promesita buso, ili rapide konstatis, ke mi vane atendis, la buso por Francujo jam foriris. Per petoj ĉe la informejo kaj serĉadoj sur siaj poŝtelefonoj, ili trovis solvon por mi.

Baldaŭ venis buso por Vieno, de tie mi havos trajnon por Strasburgo. Efektive buso venis kaj prepariĝis por veturado al Vieno, la ŝoforo eĉ kunprenis min sen peti pagon, ĉar li laboris por Eurolines. En Vieno, li deponis min apud stacidomo, kaj foriris por plia vojaĝo. Kaj jen denove mi, sola kun pezaj valizoj, kiu vane dum eterne longaj minutoj ŝercis informantojn (denove ĉi-tie la informejo estis fermita). Katastrofo! Post longa serĉado mi eksciis, ke la ŝoforo ne lasis min en la ĝusta stacidomo. Ekzistas alia stacidomo, kiu nomiĝas Westbahnhof, kaj mi devos iri per la tramo ĝis tiu-ĉi. Mi finfine iom bonŝancis, helpema viro de la sekurec-servo gvidis min ĝis la tramo. En Westbahnhof la bonŝanco estis denove kun mi, la vendejo de biletoj estis malferma, mi povas informiĝi pri solvoj, aĉeti biletojn, eĉ uzi trajnon post 30 minutoj (tion mi ne plu esperis), koni la numeron kaj situon de la kajo, sur kiu mi devos atendi. Ĉio estis perfekta, krom la prezo; mi devis pagi 152 eŭrojn! La sekvo ne estis mirakle facila, ĉar mi devis uzi ankoraŭ 5 sinsekvajn trajnojn, serĉi sur kiujn kajojn envagoniĝi, transporti miajn valizojn kaj sakon de trajno al trajno, kaj nur post longa nokto, mi povis atingi la lokon, kie mi devintus esti, se la unua ŝoforo ne fuĝintus sen mi. Kia nokto! Kia kolekto de malagrablaĵoj! Bonŝance mi revenis de internacia renkonto SES, kiu estis tre bon-etosa kaj vere energi-dona. Tio helpis min, ĉar sperti tiom da sinsekvaj problemoj povintus esti ne-eltenebla por alia homo ol esperanta esperantisto!

la 20an de julio 2014, Ginette MARTIN

Jen pri niaj aventuroj en Lourdes, Catherine.

Lunde la 23-an de julio, ni forveturis je la 14-a horo el Verduno, por trafi niajn geamikojn en Bar-le-Duc.

La etoso estis jam festa kaj varma en la buso kun kantoj kaj preĝoj, ĉar la vojaĝo daŭris tutan posttagmezon kaj nokton.

Ni alvenis en Lourdes la 24-an de julio je la 10-a horo, por la matenmanĝo, kaj instaligo en la ĉambroj.

La ĉambroj estis komfortaj, kun vera duŝejo en la ĉambro, speciale aranĝita por handikapuloj.

Ni estis 3 personoj, kiuj havis tiun aparaton por la apnejo de la dormo, kaj alia amikino suferis je diabeto.

Por la unua tago, ni spektis belan filmon pri Bernadette Soubirous, kaj prezentadon de la urbo Lourdes.

La episkopo Sinjoro Maupu benis nian grupon (3 busoj + 2 busoj de handikapuloj).

Poste, ni ĉeestis belan internacian diservon kun imponaj delegacioj el Britio (regiono de Westminster) kaj Aŭstrio.

La delegacio de Verduno portis fiere la belegan flagon de "katolika helpo" el Verduno.

Pli ol 3000 personoj, kun multaj handikapuloj.

Feliĉe, mi povis rigardi la diservon pere de gigantaj ekranoj, speciale aranĝitaj por surduloj.

Ni havis ankaŭ plurajn atelierojn pri desegnado, origami, pentraĵo de ikonoj.

Mi rimarkis belajn ornamaĵojn el Japanio en la akceptejo.

Ĉar la "Cité St Pierre" estas grandega, estis tuta sistemo de transportoj pere de etaj ĉaretoj; tiu sistemo multe plaĉis al mi, ĉefe kiam pluvegis (tio okazis unu tagon).


Estis ankaŭ diskutrodo pri filozofio.

Jen la temoj: "La joie est le premier et le dernier mot de tout l'évangile" (P. Claudel); "Lorsqu'on le communique, le bien s'enracine et se développe".

Ni lernis danci kaj kanti kun la grupo el Aix-en-Provence, jam ekde la 7-a horo post la matenmanĝo.

Mi rimarkis la kuraĝon de tiuj junaj pastroj, kiuj zorgis pri ĉio.

Jen pri niaj aventuroj, plej amikece, Catherine.

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.87.01.00.39	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.ef@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ino Catherine KREMER	03.87.01.00.39	catherine2.kremer@laposte.net
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur2@yahoo.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

Abono al La Informilo →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Amy Hurstel	13. Humoro	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i></p>
2. ILEI en Montevideo	14. Staĝo en Sankt-Peter	
3. ILEI en Montevideo	15. Staĝo en Sankt-Peter	
4. ILEI en Montevideo	16. En la reto	
5. Nitra	17. Distra Paĝo	
6. Nitra	18. Abonoj kaj kotizoj	
7. Nitra + Jacqueline	19. UK Bonaero	
8. Komitato	20. UK Bonaero	
9. Angulo de la prezidanto	21. Postkongreso	
10. Muzaiko	22. Postkongreso	
11. Libro-servo	23. Postkongreso	
12. Libro-servo	24. Nia fototeko	

Angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj,



Finiĝis la someraj ferioj. Mi esperas, ke vi ĝuis partoprenon en plej diversaj Esperanto-aranĝoj en- kaj eksterlandaj. Jam en ĉi tiu numero de LA INFORMILO vi havos la plezuron legi priajn artikolojn verkitajn de niaj vojaĝintaj membroj.

Sed ankaŭ vintre vi povas vojaĝi virtuale... tra la mondo de la libroj. Tuj post la kreo de la Internacia Lingvo Zamenhof mem komprenis, ke originala verkado en Esperanto kaj traduko de la literaturaj klasikaĵoj tutmondaj pruvos la efikon de Esperanto. Ekde tiu pionira laboro ne ĉesis la produktado de verkoj originalaj aŭ tradukaj. Literaturo estas ekde la komenco la plej daŭripova faka agado en la Esperantomovado kaj ĉiu inter ni kapablas ĝin pluivigi per la nura aĉetado kaj legado de la aperantaj libroj. Al tia subteno de la verkada laboro mi ĉi-angule vin invitas. Nia fidela libroservisto Jean-Luc THIBIAS senpacience atendas viajn mendojn. Konsultu la katalogon de nia riĉenhava libroservo en nia retejo <http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr/>

Agrablan legadon! Kaj pensu eventuale pri donaca sendo de libroj al geamikoj!

Edmond LUDWIG



En la antaŭa numero de La Informilo estis forgesitaj la rezultoj por la departemento 55

Bonvolu trovi ilin ĉi-apude

<i>Departemento</i>	<i>Numero da voĉoj</i>	<i>procentaĵo</i>
55	141	0,23
<i>urboj</i>		
VERDUN	18	0,35
LIGNY	6	0,49
COMMERCY	4	0,29
ETAIN	3	0,31
BAR LE DUC	9	0,21
VOID-VACON	6	1,26
SAINT-MIHIEL	2	0,20
LES EPARGNES	1	3,45

La retejo de nia asocio spertis iom da problemoj.

Jam ne estas alirebla: <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Bonvolu ekde nun konsulti nian novan retejon

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr>

ĝi daŭre estas ankaŭ atingebla per

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Eblas trovi en ĝin informojn pri nia asocio, pri pasintaj eventoj, pri la lokaj grupoj, pri planitaj eventoj. Krome eblas konsulti nian aktualigitan Libro-servon.

En la rubriko "Albums photos" eblas trovi fotojn de pasintaj eventoj.

Pluraj ligoj ebligas malkovri aliajn retejojn en Francio kaj en la Mondo.

Por enskribiĝi al nia dissendolisto, sendu mesaĝon al:

alzaco-loreno-subscribe@yahoogroupes.fr

Poste vi estos akceptita de la administranto. Ĉiuj membroj de la listo (kaj nur ili) povas sendi kaj ricevi mesaĝojn de la listo. Por skribi uzu jenan ret-adreson :

Alzaco-Loreno@yahoogroupes.fr



Muzaiko

Jen interesa retejo por aŭskulti muzikon, elsendojn, registraĵojn kaj eĉ por mem partopreni en ĝi.
<http://muzaiko.info/>

Nun estas ludata...

Eterne Rima, Tone, La Paŭkluk, Pieĉjo - Nia hiphop'

[Hejmo](#)
[Kaskedo](#)
[T-ĉemizo](#)
[Aŭskultu](#)
[Podkasto](#)
[Pri Muzaiko](#)
[Partneroj](#)
[Programeroj](#)
[Subtenu](#)
[Partoprenu](#)
[Kontaktu](#)

Bonvenon al Muzaiko!

Muzaiko estas tuttempa tutmonda tutmojosa tutesperanta retradio-kanalo! Muzaiko ludas por vi 24 horojn en tago muzikon, programerojn, novaĵojn, informojn, raportojn, arkivaĵojn kaj multe pli!

Se vi volas scii pli aŭ ŝatus [kunlabori](#), vi estas tre bonvena skribi al **info ĉe muzaiko.info** - Muzaiko estas via radio, kiun ankaŭ vi kreas!

Ĉu vi scias ke eblas ĉiam aŭskulti multajn el la programeroj de Muzaiko? Por tion fari klaku [ĉi-tien](#), elektu vian ŝatatan programeron, klaku al detaloj, kaj poste ĝuu la aŭskultadon.

Aktuala programo

Ĉiuj horoj montriĝas laŭ via loka horzono.

- **14:00-14:30:** Jérémie Sabiyumva intervjuas Hassanon pri la Senegala movado dum la Afrika Kongreso
- **14:30-15:00:** Jeanne kaj Louise rakontas al Mirejo pri la programo kaj etoso de la Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek
- **15:00-16:00:** Interesaj el la 188a kaj 189a podkasto de [Radio Verda](#)
- **16:00-17:00:** El la kelo de Radio Zam: Debato pri eŭropa konstitucio

kaj poste la lastaj 4 programeroj ripetiĝos ĝis 05:00 laŭ via loka horzono.

Tuttempa programo

<< **Septembro 2014** >>
Lun Mar Mer Ĵaŭ Ven Sab Dim

Nova projekto kreas tuttempan radion en Esperanto

Ĉu vi aŭdas Esperanton parolatan ĉiutage? Preskaŭ certe ne, eĉ se vi fidele elŝutas kaj aŭskultas ĉiujn podkastojn de podkastaro.org. Nur la ĉina retradio elsendas ĉiutage en Esperanto, kaj nur unu horon. Do kiuj eblecoj restas, se vi ne tre interesiĝas pri ĉina politiko nek havas esperantoparolantajn samdomanojn?

Tiun mankon sentis ankaŭ grupo da esperantistoj unue formiĝinta dum la Brita Kongreso ĉi-printempa. Kaj ĉar inter ili estas spertuloj pri radio kaj multaj entuziasmaj aktivuloj, ili decidis kaj sukcesis starigi retan radistacion. La plej grandan problemon ne prezentis la teĥniko nek programaro; pro la spertoj kaj entuziasmoj de la kora teamo jam post kelkaj tagoj estis provelsendo. Iom da diskuto sekvis pri la nomoj kaj sloganoj, kaj la teamo elektis la nomon Muzaiko.

Interkonsentoj kun muzikistoj kaj podkastantoj venis poste, kaj fine la leĝaj permesoj evidentiĝis la plej granda obstaklo. Nun nur restas etaj bariloj ĝis baldaŭ vi povos tuttempe aŭskulti ĉe <http://muzaiko.info>

Granda parto de la programo estos muziko en Esperanto, sed ĝi certe ne estos la tuto. La antaŭe menciitaj podkasto plenis kelkajn horojn ĉiutage. Tiel podkastantoj trovas pli grandan publikon por siaj verkoj, kaj aŭskultantoj pli facile povos aŭdi la plej freŝajn podkastojn el la tuta mondo. Kaj finfine estos ankaŭ originalaj kreaĵoj de Muzaiko. Laŭcele estu mondaj novaĵoj, diskutoj pri aktualaj temoj, intervjuoj kun famuloj kaj fakuloj, raportoj de okazaĵoj en Esperantujo, kaj multaj aliaj proponitaj programeroj.

Kaj via helpo estas tre bonvena. Vi povas sendi viajn ideojn, sonraportojn, aŭ mallongajn sonreklamojn pri iu ajn temo al [info\(ĉe\)muzaiko\(punkto\)info](mailto:info(ĉe)muzaiko(punkto)info). Krome vi povas aliĝi la retdiskutliston ĉe <http://groups.google.com/retradio-projekto>. Aŭ se vi havas grafikan talenton, vi povos gajni la unuan t-ĉemizon de Muzaiko per krei logon por la radio. Kaj ne forgesu viziti <http://muzaiko.info>!

Rogier Huurman



Aŭskultu tuj per Radionomy! →



Aŭskultu tuj per muzikludilo! →

Aŭskultu Muzaikon

- Per via preferata [muzikludilo](#) (rekomendita)
- Per la [Radionomy](#)-a enpaĝa ludilo
- Per tiu [muzikluda kromprogramo](#)
- Per via [Android-aparato](#)
- Per via [OUYA-ludkonzolo](#)
- Se vi ne sukcesas aŭskulti Muzaikon, skribu al [info ĉe muzaiko.info](mailto:info@muzaiko.info)

Babilu kun ni tujmesaĝe

- Per via IRC kliento ĉe [#muzaiko@freenode.net](irc://freenode.net/#muzaiko) ([klarigoj ĉe la viki](#))
- Per [TIT IRC kliento](#) (tajpu kromnomon en la "Nickname" kampo, solvu la



El nia libroservo



Informoj

⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Sankt Peter la 17/19ajn de oktobro 2014.

Tie multaj novaj libroj atendas vin !

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est : <http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr>

Ĝis baldaŭ ! Jean-Luc Thibias

1



2



3



4



1) **Brigo kun veneno**, Krimromano, **Ronald Gates**, *Flandra Esperanto Ligo*, 2014, 92 paĝoj, **7,50 €**. Vidu la recenzon de Edmond Ludwig dorsflanke.

2) **Konvinka kamuflaĵo**, membiografio, Trevor Steele, *Flandra Esperanto Ligo*, 2014, 272 paĝoj, **19,00 €**. Vidu la recenzon de Edmond Ludwig dorsflanke.

3) **Homoj de Putin**, Diversaĵo, Kalle Knivilla, *Flandra Esperanto Ligo*, 2014, 168p, **15,00 €**. Vidu la recenzon de Edmond Ludwig dorsflanke.

4) **De Patagonio al Alasko**, artikolaro, Tibor Sekelj, *Durdevac*, 2014, 258 p, **16,00 €**. Vidu la recenzon de Edmond Ludwig dorsflanke.

...kaj baldaŭ alvenos novaj libroj eldonitaj de nia konata samideano Tomasz Chmielik:
poemaro de kosova poeto

kaj "Zamenhof" de Walther Zelaŝni

Ankaŭ survojas libroj prizorgitaj de Mikaelo Bronŝtejn. Sed ĉu ili alvenos antaŭ la venonta renkonto?
Pliajn informojn vi ricevos en la venonta Informilo!

Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉisuban mendilon)
- per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO" **IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97

BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.



Resumoj, recenzoj, opinioj

Briĝo kun veneno (Ronald Cecil GATES) – FEL Antverpeno 2014

Jen krim-romaneto laŭ la plej tradicia maniero de postmurda enketado en universitata rondo de briĝoludantoj. Ĝi ampleksas nur naŭdeko da paĝoj kaj estas skribita kun la helpo de la retpaĝaro www.bonalingvo.org, kio garantias malsvarmon de novaj radikoj. Konsilinda legaĵo! E.L.

De Patagonio ĝis Alasko Tibor Sekelj Ĝurdevac, 2014

Tiu ĉi 250-paĝa belege kartone bindita libro kunigas 41 artikolojn de la ege konata esploristo kaj esperantisto Tibor SEKELJ. Pri tiu artikolaro la aŭtoro skribis: "... la materialon pri tiu ĉi 'impreslibro' mi kolektis dum kvin vojaĝoj, ene de 45 jaroj, inter 1939 kaj 1984."

La artikoloj estas tradukitaj el la tiama serbokroata lingvo al Esperanto fare de 25 samideanoj. Redaktis la tuton Josip PLEADIN.

La rezulto estas ege interesa plej divers-tema dokumentaro pri granda nombro da amerikaj landoj, ekde la plej nordaj ĝis la plej sudaj. Oni konatiĝas kun ties pejzaĝoj kaj kun praaj kaj nunaj popoloj kaj ties kulturo. Ĉio tio estas rakontita laŭ tute persona maniero de fakulo/etnologo, kiu ne nur science distance analizas, sed nepre home observas. Resume: kiel esperantisto.

Ege leginda libro, des pli ke eblas ĝui aparte ĉiun ĉapitron.

E.L.

Homoj de Putin (Kalle Kniivilä) Flandra Esperanto-ligo 2014

Eĉ se vi ege interesiĝas pri politiko, eĉ se vi estas kutima scivolema gazetleganto, eĉ se vi sekvas la novaĵojn per la radio aŭ la televido, mi dubas, ke vi legis/aŭdis, kion vi povas legi en la komenco de tiu ĉi jaro 2014 aperigita libro de la profesia kaj ekster Esperantujo jam premiita finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä. De tempo al tempo Esperanto avanas.

Li studis la rusan lingvon kaj estis studento en Rusio en 1989, kio ankoraŭ donis al li la eblon, konatiĝi kun la soveta socio. Jen kio nun faciligis al li enketadon en Moskvo kaj en diversaj rusiaj regionoj pri la socia situacio en la Rusio de Putin. Liaj kunparolantoj estas kaj simplaj civitanoj, kiuj ne specife interesiĝas pri politiko, kaj kritikantoj de la politiko de tiu sama Vladimir Vladimiroviĉ Putin.

Tiklis lin la konstato, ke malgraŭ la kritika sinteno de iuj grupoj de moskvaj civitanoj, Putin plurfoje sukcesis esti reelektita, kaj eble denove povos esti elektata.

Respondojn vi trovos en tiu ĉi interesega verko,

Cetere: imagu, kio eblus, se nia movado sufiĉe viglus kaj kapablus proponi tuj post apero nacilingvajn eldonojn en pluraj landoj !!!

Kalle Kniivilä estras la sendependan movadan gazeton retan *Libera Folio* <http://www.liberafolio.org/> E.L.

Konvinka kamuflaĵo (Trevor STEELE) FEL 2014


En la "Provizora resumo" post sia aŭtobiografio aperigita de Flandra Esperantoligo Trevor STEELE skribas: "Retrospekte mi konstatas, ke mia vivo malofte estis direktata de la racia elemento de mia psiĥo. Malmulto estis planita kaj poste plenumita. Mi sabotis plurfoje iun karieron kaj plonĝis instinkte sed ne pripense en novan aventuron. Se io restos post mia forpaso, estos miaj verkoj, sed dum pluraj jardekoj mi ne sciis, ke mi estas latentata verkisto. Tamen eble tia vivo, neantaŭvidebla kaj riĉa je ŝanĝiĝoj, estas la plej bona preparo por verki. Eĉ "sakstratoj" en la vera vivo povas liveri verk-materialon.

Se vi ŝatis la romanojn de Trevor STEELE vi certe ankaŭ frandos lian aŭtobiografion, en kiu li malkamufas sin. Vi ankaŭ malkovros sciindaĵojn pri la landoj, en kiuj li gastis. Jen libro kaj legenda kaj leginda.

E.L.

mendilo:	
Bonvolu sendi tiujn librojn:	al jena adreso:
	S-ro/ino
En	Subskribo:
la	

Humora paĝo



Paĉjo, kiel povas panjo paroli tiel multe, se la literoj estas nur 28?



Karabenistoj

Du karabenistoj ferias en Afriko kaj iras por ĉasi leonon. Mortiginte leonon, ili forlasas sian ĵipon, atingas la leonon, prenas ĝin per la kolhararo kaj trenas ĝin al la veturilo.

Indiĝeno, vidante tion, sugestas: - Se vi trenas ĝin per la vosto estas pli facile.

Ili dankas lin, prenas la leonon per la vosto kaj komencas treni ĝin.

Post duonhoru unu diras al la alia: - Certe, treni la leonon per la vosto estas pli facile, sed tiel pli kaj pli ni malapudigas de la ĵipo.



Sed, ĉu valoras elspezi tiom multe por apelacio?



Mi neniam akceptas inviton de la unua alveninta. Sed, ja, vi estas la dua.

76a regiona staĝo de **esperanto**

France-Est

36-a BAVELO-Seminario

17 - 19 Oktobro 2014

Domo Maria Lindenberg, Sankt Peter



La monto Lindenberg estas unu el la grandaj fortolokoj en la Nigra Arbaro. Super la valo Dreisamtal oni rigardas al la monto Feldberg kaj al la vere altaj montoj en la Suda Nigra Arbaro. En la okcidento - se oni bonŝansas - oni vidas la vogezojn. Tiu ĉi loko kiel neniu alia invitas al konsciigo, al retro-rigardo al la tempo de antaŭ 100 jaroj, kiam komenciĝis la Unua Mondmilito. Kadre de diverstemaj prelegoj Ed Borsboom, Bernhard Eichkorn kaj Edmond Ludwig per tralupea rigardo al la sorto de unuopaj homoj alproksimigos al ni la tiamajn okazaĵojn.

Aldone al tio la pejzaĝo de la natura parko Suda Nigra Arbaro instigas, portempe sin liberigi de la ĉiutagaj rapideco kaj premo kaj de la bruo de la urboj. Eblecoj por ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo kaj al la lago Titisee subtenos tion.

Wallfahrtskirche Maria Lindenberg

Kiel kutime ni ne neglektos la lingvan flankon. Krom la "klasikaj" kursoj por komencantoj kaj progresintoj ankaŭ ĉi-foje estos paroliga kurso kaj la prelegoj de la t.n. bukeda kurso. En internacia etoso kun multaj partoprenantoj el najbaraj landoj el lingvolernado rapide fariĝas lingva travivaĵo.

Kompletigos la aranĝon instiga vespera programo.
Foto Sankt Peter: Wikimedia Commons
Foto Pilgrima Preĝejo Maria Lindenberg: Joergens.mi/Wikipedia, permesilo CC-BY-SA-3.0 (de)

Programo de la BAVELO-Seminario 2014

Kursoj kaj petataj prelegantoj

A - Kurso por komencantoj 1 (Frank Vogler)
B - Kurso por komencantoj 2 (Johannes Mueller)
C - Paroliga Kurso - Konversacio/diskutado pri interesaj temoj (Edmilson Lima Serejo)
D - Bukeda Kurso por progresintoj kaj spertaj parolantoj; celataj temoj:

100 jarojn post la "Granda Milito" (Ed Borsboom)
Max Josef Metzger - Kiel la milito faris el li pacaktiviston (Bernhard Eichkorn)
Kiel vilaĝo disŝiriĝis pro la milito (Edmond Ludwig)
Kiel akvo de'l rivero - La verkisto Raymond Schwartz (Edmond Ludwig)
Novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias)
Retro-rigardo al la pasinta jaro per bildoj (Ursula Niesert)

Turisma programo, i.a.

- (A1) Promenado al St. Peter (pitoreska vojo, ĉ. 3 km) aŭ
- (A2) Vizito ĉe unu el la multaj abelistoj de la regiono; poste komuna gvidado tra St. Peter kun Bernhard Eichkorn.
- (B) Ekskurso al la lago Titisee.



Horaro

Vendredo, 17-a de oktobro

15:00 - 15:30 Alvojaĝo de frualvenantoj
15:30 - 17:00 Ekskurso por frualvenintoj
17:00 - 18:00 Alveno, akcepto, distribuaĵo de ĉambroj, pliaj informoj
18:00 - 19:00 Bonveno kaj vespermanĝo
19:00 - 20:00 Kursoj - parto 1
ekde 20:15 Vespera programo (interkonatiĝo, filmo) poste trinkejo ("knajpo")

Sabato, 18-a de oktobro

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
09:00 - 10:15 Kursoj - parto 2
10:30 - 11:45 Kursoj - parto 3
12:00 - 13:00 Tagmanĝo
14:00 - 17:00 Ekskursoj (St. Peter, lago Titisee, vidu supre)
17:00 - 18:00 Citro-konzerto (planata)
18:00 - 19:00 Vespermanĝo
19:00 - 20:15 Kursoj - parto 4
ekde 20:15 Muzika vespera programo poste trinkejo ("knajpo")

Dimanĉo, 19-a de oktobro

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
08:00 - 09:00 Diservo (Bernhard Eichkorn)
08:30 - 09:30 Forlasado de la ĉambroj
09:30 - 10:30 Kursoj - parto 5
10:30 - 11:30 Kursoj - parto 6
12:00 - 13:30 Tagmanĝo, adiaŭo

Sankt Peter estas vilaĝo en la natura parko Suda Nigra Arbaro (Südschwarzwald), ĉ. 20 km oriente de Freiburg. La seminario okazos en la Domo Maria Lindenberg, seminariejo kaj ripozejo de la diocezo Freiburg, situanta iom ekstere de la vilaĝo.

Haus Maria Lindenberg ((vidu pli malsupre ĉe Alvojaĝo)
Lindenbergstraße 25
79271 Sankt Peter
Tel: 0 76 61 / 9 30 00
Fax: 0 76 61 / 93 00 33

Alvojaĝo per trajno:

Veturu ĝis la ĉefstacidomo de Freiburg, de tie per buso tra Glottertal al St. Peter. Alternative per trajno al Kirchzarten, post per buso al St. Peter.

Alvojaĝo per aŭto:

Sur aŭtoŝoseo A5 (Frankfurto-Bazelo), elirejo Freiburg Nord. Tra Glottertal al St. Peter, de tie restas ankoraŭ ĉ. 3 km ĝis Lindenberg (simple sekvu la ŝildojn).

La mapo montras la pozicion de gastejo sur la monto Lindenberg - Domo Maria Lindenberg estas najbara konstruaĵo samloka.

Haus Maria Lindenberg Lindenbergstraße 25 79271 Sankt Peter

Telefono: 0 76 61 / 9 30 00
Telefakso: 0 76 61 / 93 00 33

Kostoj:

La aliĝkotizo estas 30 €
10 € por gejunuloj ne pli ol 26-jaraj.
Aldoniĝos laŭkaze la kostoj por tranoktado/manĝado en la seminariejo resp. por biletoj dum la ekskursoj.
Kostoj por du tagoj inkluzive de manĝado en la Domo Maria Lindenberg: 2 tranoktadoj en dulita ĉambro: 100 €, en unulita ĉambro 130 €.

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas.
La aliĝo validas post alveno de mono:

Pagebla per ĝiro al
CCP Esperanto France-Est
1997 72 W Nancy
per franca ĉeko al
Esperanto France-Est
sendata al
André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Aliĝilon bonvolu sendi al:

S-ino Inge SIMON,
Brünner Str. 20
DE-73431 AALEN
Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.
Simon@esperanto.de



Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Sankt-Peter

S-ro S-ino	Familia nomo		Persona nomo	Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon <input type="checkbox"/> A <input type="checkbox"/> B <input type="checkbox"/> C <input type="checkbox"/> D Mi / ni interesiĝas pri la programero por fru-alvenantoj: <input type="checkbox"/> Jes <input type="checkbox"/> Ne Mi alvenos per aŭto <input type="checkbox"/> per publikaj transportoj <input type="checkbox"/> Mi / ni volas tranokti en la Domo Maria Lindenberg <input type="checkbox"/> en unulita ĉambro <input type="checkbox"/> en dulita ĉambro Manĝoj: <input type="checkbox"/> Mi / ni volas manĝi vegetare <input type="checkbox"/> Alergio kontraŭ <input type="checkbox"/> Sen manĝo
1				
2				
Adreso				
Telefono:				
Ret-adreso:				
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est				
Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe	
matenmanĝo				
tagmanĝo				
vespermanĝo				
Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo http://esperanto-bw.de/seminario-eo				

Esperanto en la reto kaj tra la mondo

Legeblas la aŭgusta retnumero de "Eŭropa Bulteno" ĉe :
<http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=423&filename=eb-140-2014-08.pdf>

Aperis Eŭropa Bulteno 140 ĉe
<http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>
 El la enhavo:

1. Somera E-Studado en Nitra
2. Reeĥoj pri la 10-a kongreso de EEŬ
3. Kiel modernigi lokan E-agadon
4. Antaŭkongreso en Biograd na moru
5. Ombudsmano senpova
6. Simpozio de Rumana E-asocio
7. Iberia renkontiĝo en Katalunio
8. Troja milito en Esperanto
9. KAEST-Konferenco 2014 en Sloakio
10. Lingva justeco laŭ Philippe van Parijs

Informcele

De la 16a ĝis la 20a de julio 2014 okazis komune en Budapeŝto la 1a Mezeŭropa Biomedicina Kongreso kaj la 19a Internacia Kongreso de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio).

La ĉefa temo estis "Kronikaj malsanoj kiel minacoj de la nuntempaj socioj en la 21a jarcento".

La oficialaj laborlingvoj estis la angla, Esperanto kaj la hungara.

Tamen, pro la ĉeesto de granda grupo da polaj universitataj profesoroj kaj studentoj, ankaŭ la pola estis uzita.

Partoprenis 183 personoj el 6 landoj.

Por pli da informoj pri la programo, eblas konsulti ĉi-suban trilingvan retpaĝaron kun 203 paĝoj :
<http://www.19a-imek.hu/sites/default/files/19th%20IMEK%20Budapest%202014%20Congress%20book.pdf>

Karaj samideanaj numismatoj !

Ĉar la nova numero de Esperanto Numismatiko estas preparata dum la venontaj du monatoj (ĝi normale aperos je la fino de la oktobro 2014) MI PETAS VIN SENDI VIAN KONTRIBUAĴO(J)N. Se vi havas interesajn novaĵojn pri numismatiko, kritikojn aŭ korektojn pri la pasintaj numeroj de nia komuna revuo, bonvolu sendi mesaĝon al la redakcia adreso:

bert.boon@skynet.be

Ne forgesu ke ENA ne estas unupersona projekto.

Ĉiuj membroj estas laŭtalente kunlaborantoj.

Mi esperas ricevi sufiĉe da kontribuajoj kaj jam antaŭe dankas vin kiuj penos kontribui al nia kluba revuo. Bert Boon

Eble interesa agado por E-klubo kaj individuaj E-aktivuloj !!!

2014-07 Burundo, Esperanto en Evoluo - evoluis

la projekto en Rumonge, Burundo, estas gvidata de Johan Derks. Tie ili sukcesis konstrui kulturdomon kun biblioteko. AVE iam sendigis lernolibrojn el Aŭstralio. Kompreneble ankaŭ tie estas bezonata mono por plia evoluo.

<http://esp-evoluo.info/financado/donacoj/>

El la reta informilo Libera Folio

<http://www.liberafolio.org/2014/la-esperanta-wikipedia-atingis-200-000-artikolojn>

La Esperanta Vikipedio atingis 200.000 artikolojn 2014-08-14 19:34

La esperantlingva versio de la reta enciklopedio havas nun pli da artikoloj ol ekzemple la slovaka, kroata, estona aŭ litova vikipedioj. La plej multajn artikolojn havas la angla Vikipedio: kvar milionojn. Pri la nova rekordo informis vikipediisto Thomas Guibal, kiu poste konsentis respondi al kelkaj demandoj de **Libera Folio**.

Kion povas fari novulo, kiu volus kontribui al plibonigo de la esperanta Vikipedio?

– Vikipedio bezonas kaj kore bonvenigas novulojn! Por bona komenco sufiĉas krei novan konton kaj sekve iri al la komunuma portalo, kie vi lernos pri la plej bazaj reguloj. Aŭ rekte al la helpopaĝo Kiel kontribui.

Tute ne necesas ampleksa scipovo pri komputiko. Ĉiu ajn esperantisto kapablos redakti la paĝon pri sia lando/ urbo/ preferata fako/ ktp. apenaŭ post kelkaj minutoj. Teknikaj aŭ enhavaj problemoj estas libere kaj amike diskutataj en nia "Diskutejo".

Kion eblas fari por altigi la ĝeneralan kvaliton de la artikoloj? Kaj kiom da esperantistoj regule kontribuas al Vikipedio?

– La rimedo por pli bona kvalito neniel estas enigmo: la plej sukcesaj Vikipedioj, kiel la angla aŭ la franca, havas multe pli grandan bazon da aktivaj uzantoj. Kompreneble estas malpli da esperantistoj ol anglalingvanoj aŭ franclingvanoj en la mondo. Se vi tamen konsideras ke al Vikipedio averaĝe kontribuas apenaŭ 200 aŭ 300 uzantoj ĉiumonate – inter kiuj eble nur kelkaj dekoj plenumas signifan nombron de redaktoj – tiam evidentiĝas, ke nia enciklopedio kun la helpo de aliaj esperantistoj povus plibeliĝi en la plej mirinda maniero!

Ni lernu per distraĵoj

1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									

HORIZONTALALE:

1. Artefarita voj' por transporti akvon.
2. Vicmontra numeralo. Sola en sia speco.
3. Scienc'
4. Malviglec'. Kreokapabl'.
5. INVERSE:Ŝafa harar'. Ad- verbo.
6. Flose laŭ la puŝo de vento. Sufikso.
7. Trinkujo. Artikolo.
8. INV:Amuzist'. Masonaĵ'.
9. INV: Ĥemia element'. Ter- kap'.

VERTIKALE

1. Militista ĉef.
2. Ag' de tiu, kiu pro- prigis al si. INV: Konjukcio.
3. Naskokvant'.
4. Malgrand'. Dans'.
5. Havanta econ elsendi lumon.
6. Ne vira.
7. Muzikinstrumento. Regnokodo de Ma- roko.
8. Pren'. Ĉielkolora.
9. Afrika palm'.

JG

		V	I	O	A	
	F	L		A		I
I		S				O L V
V			E	A		L
	E			T		S
T			S	F		I
A	I	T			L	F
	V			F	I	O
		F	A	V	S	

Plenigu la tabelon, tiamaniere ke ĉiu linio, ĉiu kolumno, kaj ĉiu kvadrato 3X3 entenu nur unufoje ĉiujn literojn de la vorto FESTIVALO

KAŜITA PROVERBO

Ordigu la frazpecojn por aperigi faman proverbon
Helpo: 5 vortoj en tiu proverbo !

AND

DGR PEZ MAL

EZO OSE NDA

GRA APR

Dankon al nia kutima kontribuanto
 Joël GRANDJEAN

SOLVO de la problemo en la 166a "Informilo"

Liter-sudoko:

U	A	T	Ĝ	N	E	O	R	M
E	N	M	O	T	R	Ĝ	U	A
R	O	Ĝ	U	A	M	N	E	T
Ĝ	T	A	N	R	O	U	M	E
M	U	R	T	E	Ĝ	A	O	N
N	E	O	A	M	U	T	Ĝ	R
A	Ĝ	E	R	O	N	M	T	U
O	R	N	M	U	T	E	A	Ĝ
T	M	U	E	Ĝ	A	R	N	O



Paciento: - Kion fari por mia terura kapdoloro?
 Kuracisto: - Estas simple, metu iom pli da sango en vian alkoholon.



Konsentite, ke la hundo estas plej bona amiko de la homo, sed vi tro postulas!

SOLVO

- Horizontale:** 1.KOKOSPALM 2.URAL. EE 3.ESKALATOR 4.MEBL. DUNG. 5.AĜA. STO 6.TOKSIS. OS 7.ITEBED 8.RESANIG 9.INT. ORELO
- Vertikale:** 1.KREMATORI 2.SEĜO. EN 3.KUKBAKIST 4.ORAL. STA 5.SAL. MIENO 6.PLAD. SBIR 7.TUS. EGE 8.LEONTOD 9.MERGOS. NO

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2015 ĝis 2017

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2014 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2015.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2014, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf duonkoste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 3 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2015	2016	2017
		Abono por adresoj en Francio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj por UFE membro:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). • Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Espéranto</i> 			11 eŭroj
	MJ(-T)				26 eŭroj
	MA(-T)				63 eŭroj
Pag-manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2015 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2015, 2016				
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)				

INFORMO KAJ ALVOKO

Sinjorino Irmgard BENGSCHE el Konstanz, fidela abonantino de LA INFORMILO kaj partoprenantino de pluraj satĝoj sendis al ni interesajn poŝtaĵojn kaj tre malvovan diskon kun kantaĵoj en Esperanto. Tiujn dokumentojn ni sendos al

Nacia Esperanto-Muzeo
"Maison pour tous"
19, rue Victor Hugo
70100 GRAY

Ni petas niajn legantojn, kiuj posedas raraĵojn aŭ privatajn inform-valorajn dokumentojn en rilato kun Esperanto, ilin sendi al la muzeo. Estantaj esploristoj certe ĝojos.

BONAERO

99^a Universala
Kongreso de
Esperanto

26 julio - 2 aŭgusto 2014

LA 99-a UNIVERSALA
KONGRESO EN
BONAERO
26.7. - 2.8. 2014



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Argentino. Ĝi estas la dua plej granda ŝtato de Suda Ameriko. Ĝiaj najbaraj landoj estas Ĉilio, Bolivio, Paragvajo, Brazilo kaj Urugvajo. Oriente ĝiajn bordojn banas Atlantika Oceano. La ĉefurbo Bonaero havas humidan subtropikan klimaton. La lando havas pli ol 40 milionojn da loĝantoj.

En Bonaero vivas 3 milionoj da ili, sed kun la ĉirkaŭaĵo ĝi atingas preskaŭ 13 milionojn da enloĝantoj. Ĝi estas ĥaosa urbego pulsanta tage kaj nokte. Kiel en ĉiu grandega urbo la loĝantaro ne facile vivas tie. Meze de bruega amaso regas malsekureco. Malbono okazis al pluraj esperantistoj. Ili estis priŝtelitaj kaj eĉ per armilminaco iu estis devigata fordoni siajn valoraĵojn.



Argentino unuafoje gastigis la Universalan Kongreson, al kiu enskribiĝis 706 geesperantistoj el 57 landoj. La evento plej parte okazis en la urbocentro de Bonaero en la hotelo Panamericano, proksime al Obelisko. Malfermo, fermo kaj ĉiuj vesperaj kulturaj programoj okazis en Teatro Metropolitan. Kiel kutime sabate vespere okazis la tradicia Movada Foiro, kie diversaj esperantistaj organizoj kaj asocioj informis pri sia ekzisto, prezentis siajn estontajn aranĝojn kaj varbis novajn anojn.


Dimanĉe la 27-an de julio inaŭguriĝis la 99-a UK per festparolado de la prezidanto de UEA Mark Fettes. La ceremonion ĉeestis ankaŭ kelkaj honoraj gastoj kaj ambasadoroj. Speciala gasto estis Roselyne Dewilde, praparencino de L.L. Zamenhof loĝanta en Argentino. Salutparolis subsekretario de la urba ministerio pri edukado, la prezidanto de LKK Jorge Cabrera, estis legita la mesaĝo de L.C. Zaleski Zamenhof. Poste salutis la kongreson reprezentantoj de partoprenantaj landoj. Ĉe la fino estis kantata E-himno kaj post tio la kongreso estis malfermita.

La ĉef-temo de la kongreso estis: *Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco.* Ĝi estis amplekse pritraktata en

grandnombre ĉeestataj prelegoj kaj diskutoj. La bunta semajna programo havis kunvenojn de esperantistaj medicinistoj, komercistoj, sciencistoj, instruistoj, kristanoj kaj aliaj religioj, nefumantoj, blinduloj, SAT-anoj kaj aliaj asocioj. Okazis kurso pri la hispana lingvo, pri tango-danco, pri kaligrafio kaj pluraj prelegoj pri Argentino. Gejunuloj havis sian programon. Tre aprezataj kaj frekventataj estis paroligaj lecionoj gvidataj de Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge.

Ili en amuza formo prezentis kursojn por komencantoj kaj spertigis progresantojn. Estis ebleco partopreni en KER-ekzamenoj al kiuj kandidatiĝis 30 personoj. Esperantlingvaj aŭtoroj prezentis siajn verkojn dum la aŭtoraj duonhoroj en la libroservo.

La nova estraro sub la gvido de la vigla kaj entuziasma prezidanto Mark Fettes alportis plurajn ŝanĝojn al la kongresa programo. La tagoj de la semajno ricevis novajn nomojn bazitajn laŭ ĉefaj punktoj de la laborplano:



lundo estis Tago de konsciigo, Tago de lernejo estiĝis Tago de kapabligo, ĵaŭdo estis Tago de komunumo kaj vendredo Tago de kunordigo.

Same kiel lastjare en Rejkjaviko, ankaŭ ĉi-jare okazis la 27-an de julio posttagmeze la Ĉina Tago en apuda hotelo Colon. Oni povis admiri belegan fotoekspozicion pri Pekino, ekscii pri la Esperanto-muzeo kaj pri Esperantomovado en Azio. La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller ricevis de ĉinaj reprezentantoj Premion de kontribuo al

Esperanto-Amikeco kaj la dokumentan filmon Longa Rivero.

Nova elemento eniris la kongreson. Kelkaj sportemuloj ĝuis historian futbal-matĉon inter esperantista teamo formita surloke kontraŭ armen-devena teamo. La entuziasmo estis granda malgraŭ tio, ke esperantistoj malgajnis. Eble tiu sperto fariĝos nova kongresa tradicio. Tamen mankis alternativa programo por nesportemuloj. Bedaŭrinde oni ne pensis pri vespera tango-spektaklo. En la urbo tiuj abundis.



son en Lillo? La plej multaj kongresantoj venis el Brazilo, Japanio kaj Francio. Bonŝance partoprenis pluraj junaj sudamerikanoj. Por iuj



ĝi estis la unua kongreso. Ili estis tre kontentaj kaj entuzismaj pri tiu sperto. Partoprenantoj ĝuis la urbon, ekskursojn, manĝojn kaj pasigis la tempon

Efektive, en la kongresa programo estis io por ĉiu. Multaj kongresanoj profitis urbajn ekskursojn por malkovrities belaĵojn kaj historiaĵojn. Per duetaĝa turisma buso eblis trairi la urbon kaj dum pli ol tri horoj admiri multajn interesajn vidindaĵojn. En la urbo troviĝas multaj muzeoj, galerioj, parkoj, ripozejoj. Tute speciala estas la kvartalo "La Boca" kun interesa arkitekturo kaj la fama buntkolora pentrita strato "Caminito". Unu semajno ne sufiĉas por vidi ĉion vidindan kaj ĝui ĉion ĝindan en tiu-ĉi urbego. Tamen oni povas diri, ke la kongreso estis kontentiga, eĉ se malgranda. Ĉu la homoj rezignis la kongreson pro longa distanco, ĉu pro tro alta kosto, ĉu pro vintra sezono en Argentino, ĉu pro ŝparo por povi partopreni la jubilean 100-an kongre-



kun novaj kaj malnovaj geamikoj. Laŭ la lastjara kutimo la estraranoj post la fino de la kongreso adiaŭis la partoprenantojn per manpremo.



Raporto de Liba
Fotoj de Andreo

Postkongreso al nordo de Argentino, al Iguasuo

En Bonaero UEA proponis kelkajn postkongresojn, al la sudo, al Ushuaia, tiam en plena vintro, al nordo, al imponaj akvofaloj de Iguasuo. Efektive en la nordo estis pli agrabla klimato ol en Bonaero kun temperaturoj je 20-25 gradoj.

Puerto Iguasuo troviĝas ĉe la landlimoj de tri landoj, Paragvajo, Brazilo, Argentino. La akvofalo Iguasuo troviĝas en Argentino kaj en Brazilo.

El Brazilo la panoramo estas pli grandioza.

Dimanĉe jam fru-matene post la kongreso en Bonaero ariĝis la post-kongresanoj por flugi al la nordo de Bonaero al Puerto Iguasuo. Ĉe la alveno jam eblis konstati la diferencon de klimato, kvazaŭ jam ne estus vintro, kun temperaturoj ĝis 25 gradoj.

La unuaj vizitoj estis al ĝangalo Aripuca (gvarania vorto por bestokaptiloj). Tie oni konscias pri la protekto de la naturo por la nuna kaj sekvaj generacioj. Giganta bestokaptilo estas konstruita el dikaj trunkoj de falintaj arboj. En la muzeo "Bildoj de la Ĝangalo" eblis admiri lignajn artaĵojn de Teófilo Allou, nev-nepo de Jules Verne. Por atingi la internon de la ĝangalo, la turistoj estas veturigataj per traktoroj kun remorkoj dum dudeko da minutoj. En la ĝangalo troviĝas majestaj arboj kaj diversaj birdo-specioj, kiel tukano, strigo kaj multaj aliaj bestoj, kiuj estas flegataj tie. Tiu centro funkcias kiel besto-flegejo.






En la vespero ni revenis al Puerto Iguasu, kie ni povis agrable promeni ĉe la rivero Iguasuo. Tie troviĝis ankaŭ la landlima ŝtono de la 3 landoj Paragvajo, Argentino, Brazilo. La rivero Iguasuo renkontas la riveron Paraná, la saman riveron, kiu finiĝas en Arĝenta rivero en Bonaero. Nia gvidanto bone klarigis pri la historio kaj la militoj, kiuj kreis la limojn inter tiuj 3 landoj. En la 19a jarcento Paragvajo ambiciis pli vastiĝi, sed ĝi malvenkis en tiu milito kaj perdis parton de sia teritorio.



En la posta tago nia celo estis viziti la akvofalojn ĉe la argentina flanko. Tie eblis ĝui grandiozajn pejzaĝojn. Luj el la ekskursantoj iris per boato plej proksime de la akvofaloj, eĉ kun la risko tute malsekiĝi. Aliaj preferis trajne atingi la lokon.



La rivero Iguasuo ĵetas normale 1700 kubajn metrojn da akvo sekunde tra siaj akvofaloj, kies roka arkitekturo estiĝis antaŭ 50 milionoj da jaroj. Sed laŭ la vetero tiu flu-kvanto ege malsamas. Laŭdire en la jaro 1978 la fluejo preskaŭ sekiĝis kaj la fama katarakto seniluziigis la vizitantojn. Male antaŭ iom da tempo pro fortegaj pluvoj la rivero multobliĝis tiom, ke ĝia akvokvanto superis 30.000 kubaj metroj sekunde. La akvonivelo suprenirinte kelkajn metrojn detruis parton de la pontoj, kiuj en la argentina flanko kondukas la turistojn ĝis "Gorĝo de l' Diablo". Tie akvo-falegoj, unu vide al la alia, malsuprenĵetiĝas kun tondranta bruego.

Per motorboatoj la videmuloj nun trairas la mankantajn partojn de la pontoj por admiri ekde sekura platformo la sovaĝan spektaklon de la bruegantaj akvoj. Personoj, kiuj vidis la akvofalojn de Niagara (Usono), asertas ke tiu de Iguasuo estas pli impona.

Oni surpriziĝas vidi inter la homoj strangan mambeston petantan nutraĵojn. Tiuj nazuoj alvenas propravele de la arbaro por profiti siamaniere de la turisma cirkonstancoj, kiel la flugkompanioj, la busoj, la hoteloj, komercistoj kaj tiel plu.





Survoje al la akvofaloj abundis nazuoj, tamen estis rekomendite nek karesi nek tuŝi ilin, ĉar ilia mordado povas esti venena. Sed eblis facile foti ilin inter la homoj.
Pro antaŭ-monataj inundoj la granda akvofalo "Gorĝo de la Diablo" ne estis alirebla. Multaj riparoj estas ankoraŭ necesaj.



La postan tagon ni celis admiri la akvofalojn de la Brazila flanko, de kie ili aspektas eĉ pli grandiozaj.

Krome ĝi estis la lasta tago en la nordo de Argentino, jam en la vespero estis planita refugo al Bonaero. Tiam ni definitive forlasis la hotelon kaj veturis direkte al la landlimo kun Brazilo. Fakte necesis relative multe da tempo ĉe la doganejo por kontroli la diversnaciajn pasportojn. Verŝajne ni atendis pli ol duon-horon. Efektive la diversaj pejzaĝoj laŭlonge de la promeno estis vere imponaj.



Super la rivero estis metitaj pontaj vojoj por ankoraŭ pli proksimiĝi de tiu tumulto. Tamen tie oni tute malsekiĝis, eĉ uzante plastan pluv-mantelon. Jam je la 18a vespere necesis forveturi, kiam ĝuste okazis la sun-subiro al tiuj mirindaj pejzaĝoj.

La restado en Brazilo daŭris nur iom da horoj kaj reveninte al Argentino, la celo estis atingi ĝustatempe la flughavenon por refugi al Bonaero.



Plej multaj partoprenintoj jam en la posta tago hejmen-flugis, plejaj je rememoroj kaj bildoj pri la kongreso kaj mirindaj tagoj de la postkongreso.



Raporto kaj fotoj de Andreo

El nia fototeko Kongreso en Bonaero



© Joaquim Mariano



Inaŭguro de la 99a Universala Kongreso.

Muzika paŭzo.

Mark Fettes prezidanto de UEA.

Subtenantoj al futbalmatĉo.

Transdono de la flago por la 100a UK en Lillo en 2015.

